



89/5.* 16-Ft

HUNGARA VIVO

Fig. 4.2.1: Disvolvigo de la fabrikado de senjuntaj tuboj en Hungario





Fig. 5.1.1: Produktopovo de elektra veldada tubofabrikado




Fig.5.1.2.1: Disvolvigo de la produktado de elektre velditaj tuboj









Fig.5.2.2: Fabrikado de spiraljuntaj tubo
1964-1968






Sekcio	Tipo de tirbenko	Maksimuma tirforto kN	Tirada povo kW	Rapido de tiro m/s	Rapido de returno m/s	Maksimuma enigebla tubodiametro, mm	Tirebla tubdiametro mm	Tirebla plej granda tublongo, m	Nombro de samtempe tireblaj tuboj
Nevarma tirejo I	ZTA 50	500	650	0,1-1	2,4 aŭtomata 0,27 mana	meze: 120 rande: 80	19-115	13,5	1-3
	15	150	19	0,22			14-30	7,2	1
	10	100	19	0,17/0,33/0,5			14-30	8,3	1
	30	300	44	0,2			25-55	8,2	1
	H 25	250	44	0,2			25-40	10,3	1
	50	500	100	0,07/0,14			60-134	8,3	1
	R25	250	44	0,2			25-55	7,2	1
Nevarma tirejo II	6	60		0,17			4-14	7,5	2/4
Nevarma tirejo III	75	750		0-0,33			14-30	9,7	2/4/6
	80	800		0-0,33			14-50	10,75	2/4
Nevarma tirejo IV	ZTA 12,5/1	125	75	0,1-1	2,9 aŭtomata 0,27 mana	meze: 60 rande: 40	14-30	11,5	1-3
	ZTA 12,5/1	125	75	0,1-1	2,9 aŭtomata 0,27 mana	meze: 60 rande: 40	14-30	11,5	1-3
	ZTA 20	200	110	0,1-1	2,7 aŭtomata 0,27 mana	meze: 75 rande: 55	14-50	11,5	1-3

Tabelo 6.2.1: Karakterizaj teknologiaj parametroj de tirbenkoj





GAJA PAÇO



Ho, rapidu!

Nudulinojn pentri preferanta — kaj serĉata — pentristo vokis al si pozulinon, sed pro la malvarma ĉambro ŝi ne rapidis senvestiĝi. Bone — diris la majstro — mi kuiras al vi varmega teon por iom varmiĝi!

Dum la gaja tetrinkado aŭdiĝis paŝoj el la ŝtuparejo, la brovoj de la majstro atenteme kuntiriĝis, kaj tuj li urĝis ŝin:

— Ho, senvestiĝu rapide, kara! Rapidu, rapidu, ĉar jam venas mia edzino!

Malrapidu!

— Via pulso batas tro-tro malrapide, sinjoro — asertas maltrankvile kuracisto.

— Faras nenion, doktoro. Estante pensiulo mi havas ja tempon...

Ĉu ŝi tro rapidis?

— Karega mia! — komencis la edzineto (pro kio la edzo jam suspektis iom) — hodiaŭ mi sukcese malpliigis viajn ŝuldojn...

— Ĉu vere? Kiel do?

— Nu, vi finfine reakiros grandan sumon el la ĝis nun enpagita aŭto-asekuro...

Fianĉinoj ne rapidu!

— Mi aŭdis, ke via fianĉino ĉesigis la ligan kun vi. Do, Maria-Roza ne rapidis iĝi via edzino, pro kio mi miras.

— Ŝajne tiel estas. Ĉu vi volonte geedziĝus al persono alte egoista, aplomba kaj tromemfida?

— Kun tia persono, kompreneble, mi tute ne volus...

— Ni vidu, ankaŭ Maria-Roza ne volis...

Pro motocikloj

— Diru jam al mi — demandis la eturba kirurgo de la motorvendisto — kiom da motocikloj vi vendis dum la nuna monato?

— Dekon, ne pli.

— Nu, tiam mi estas scivolema, kie troviĝas la lastaj tri el la aĉetintoj...

Sur tramo

— Pro manko de via bileto — diras severe kontrolisto — vi punpagos 200 forintojn.

— Sinjoro kontrolisto, bonvolu iom atendi — insistas la poŝtelisto — mi ankoraŭ malhavas da mono. Nur ĉe la antaŭa haltejo mi surpaŝis la tramon...

Sur modernega trajno

— Kien iros tiu trajno, sinjoro konduktoro? — demandas (venonta) pasaĝero.

— Mem kompreneble tien, sinjoro, kien vi deziras! — sonos la ĝentilega respondo ĉe la plej modernegaj trajnoj (de la venonto). Onidire pri tio diskutos la venonta kongreso de esperantistaj fervojistoj. Interesiĝantoj — malpacienuloj — bonvolu urĝe aliĝi!

Sur ponto

Super pitoreska rivero iu fotografas la vidindaĵojn de sur la ponto.

Abrupte alkuras virino kaj krias al li:

— Venu urĝe, jen tie iu dronas en la fluo!

— Mi vere bedaŭras, sinjorino, sed mia filmo jam elĉerpiĝis...

Aviada envojo

Fiera trupo de hirundoj flugas brave al Afriko, kiam super ili forrapidas jet-aviadilo. Kun envio ili interrigardas:

— Kiel urĝas por li! — kapbalancas iu hirundeto.

— Ĉu vi miras? Ja brulis lia postaĵo!

Ĉu envojo?

— Petro, ĉu vi scias, ke ege plaĉas al mia via edzino?

— Ankaŭ al mi ŝi tre plaĉas, kara Paŭlo, se ŝi estus via edzino!

Denove la blonda haro

— Kion signifas tiu blonda haro sur via mantelo, Alojzo?! — fulmas edzinaj okuloj.

— Nur tion, kara, ke vi forgesis brosi mian mantelon deponde kiam vi farbigis nigra vian hararon!


Konsilon al poetoj

ni citas el „Arto Postika” de C.E.R. Bumy en la linioj V.13. kaj 14., H.1. kaj V.59. (ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 14. Resti senmova sur piedoj, 15. Demandvorto, 16. Ne fizike, sed ..., 17. Longa osto de la antaŭbrako, 18. Finfarita, 20. Montru gajecon! 21. Kunaranĝi objektojn (R), 22. Artikolo. 23. Tipa glucido en kelkaj fruktoj (R), 25. Literatura verko, 27. Reen: pec' el skelet', 29. Klopodu identigi! 30. Argentbrila malmola metal', 31. Belaj kortobirdoj, 32. Maldensa peceto, balanciĝanta en aero (R) 34. Laŭdu..., sed restu sur la tero! 36. Identaj konsonantoj, 37. Rivereg' en Siberio, 39. Iri sencele (R), 40. Miksita ido (!), 41. Identaj vokaloj, 42. Armitan malamikadon, 45. Mallonga (R), 46. Aliaj homoj, aliaj ..., 47. 2000, 48. Adverbo, 50. Ŝafharo (R), 51. Korpoparto (R), 52. Angla ĉefministro dum la Napoleona erao, 54. Filino de gefiloj, 57. Komparativa konjunkcio, 58. Pli ol necese, 59. Konforma al la vero (R), 60. Malgrandegulan, 63. Ekz.: skatol' por teĉ, 64. Balancetis infanon, 66. River' kaj industria regiono en FRG, 67. Kulturatan kampon.

Vertikale: 2. Helena gigant', portanta la ĉielon, 3. Giatan, densan kortontekstaĵon, 4. Grupo de samspecaj objektoj, 5. Persona pronomo, 6. JKR, 7. Juvelaĵo, dekoraciita per arĝenta folio, 8. Elĵeti ekz. sablon (R), 9. Numeralo, 10. Artefaritan hararon, 11. Intimuloj, 12. Judgermanan ĵargonon, 18. Osto ŝirmanta la genuon (R), 19. Kulturata kampar', 24. Bulgariaj monoj, 26. Reen: tabelvorto, 28. Ekz. la lingvoj: rusa, bulgara, ktp. 31. Preĝejo en orienta Azio, 33. Rumania monunujo, 35. Prefikso, 36. Prepozicio, 38. Ŝatatan, 40. Ekzemple la linio V. 5., 42. Sud Amerika ŝtato (ne Esperanta formo), 43. Muzikan sonon, 44. Nenian kvanton, 45. Reen: puŝi ion pintan en korpon (R), 49. Elmetadi al aero (R), 51. Koncerna indiano boaton, 53. Kavaj lokoj, 55. Karesi per mano (R), 61. Part' de kurb', 62. Rilata al prauloj de Persoj kaj Hindoj (R), 63. TGU, 65. Sulfuro kaj jodo, 67. Sufikso por membreco.

I. Z.



Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1988/5 (devus aperi en 1989/2):

„Ke tamen duan fojon flamas la rozo.
Kara, mi jam scias pri ĉi aŭtunalmozo.”

(Edwin de Kock)

Premion gajnis: Grzegorz Ciemny, Bydgoszcz, PL; Sergej Derevjannih, Ufa, SU; Molnár László, Székesfehérvár, H.

Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1989/2:

„Pri la fideleco de la virino oni ne rajtas fari facilan-
majnd eklarojn antaŭ ŝia morto.” (Sándor Szathmá-
ri)

Premion gajnis: s-ino Swoboda Damjanova, Kazanlak, BG; s-ro S. Linke, Halle, GDR; s-ino Marie Voleská, Česká Trebová, CS.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes
Esperanta Antologio

Poemoj 1887-1981
Redaktis: William Auld
1984

Tiu ĉi nova eldono de Esperanta Antologio verŝajne jam havas sian lokon sur la librobreto de esperantistoj.

1. Kiom da originalaj poemoj de Zamenhof troviĝas en la libro?
2. Kiu estis la aŭtoro de „Ciklo de l' arĝenta astro”?
3. Kiu verkis la poemon: „Al abortita ido”?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1989/2:

1. Eŭristhetos akompanis Pithagorason al ekzilo.
2. Serĝento William estis hispana-indiana hibridulo.
3. La novelon „Vincenzo” tradukis K. Kalocsay.

Premion gajnis: s-ino Anna Dvoráková, Tvrdosin, CS; s-ino Sabine Fiedler, Leipzig, GDR; s-ro Dzjubinski Zdislaw., Zamosc, PL.

La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

LETERKESTO

S-ino Ana Célia Mesquita (23) artistino, ktm. *Florianópolis-S. Catarina* DNER-16-DRF, Ca.Post. 413, CEP 88001, Brazilo. — S-ino Eliane Santos Velloso (25) biologio-studentino, ktm. *Barreiros/S. Catarina* Rua Independente 1006, ap.02, Bloc b/Rita Cássia. CEP 88100, Brazilo. — Teknikisto Krzysztof Dusik (36) pri lingvoj, Eo. *Zakopane* ul. Goszycynskiego 22A, PL-34-500. — Flegistino Elzbieta Ochmanek (45) kun edzo kaj 3 gefiloj, pri kulturo de aliaj landoj. *Andrichów*, ul. Lenartowicze 5/22, PL-34-120. — Bibliotekistino Krystina Walc (28) pri literaturo, arta teksado, brodaĵoj, teatro, filmo, kol. pm. de pentraĵoj kaj bestoj, brodaĵdesegnojn. *Rzeszów* ul. Sportowa 4/102, PL-35-111. — Ing. Rein Saar (34) spec. de aŭtoj. *Haapsalu* Niine 22, Estonio SU-203.170. — Ing. Alar Tónisson (25) spec. de aŭtoj, k.a. *Haapsalu* Mulla 10-88. Estonio SU-203.170. — Studento Vladimir V. Vinogradov pri Eo, filozofio, politiko, religio, lingvoj k.a. ktm. *Taşkent*, Zelenaja 38. SU-700.167. —

Lic. Hidetoshi Umehara (japano) kun hungaro pri muziko k.a. ankaŭ alilingve. *México* 15 D.F. Korte 9-A. 5016 Col. Panamericana; Deleg. G.A. Madero 07770, Meksikio. — S-ro Odeni Barbosa interŝ. senvalorajn monbiletojn, kompensas per libroj, pm, pk interkonsente. *Chapecó* SC Ca.Post. 794, BR-89800, Brazilo. — Fotisto Vadim Ilejin (35) apud Leningrado, pri ludadoj, lingvoj, kol. pm. moneroj. *Tosko* a/k.103, SU-187.020. — F-ino Diana Snapkankaité (17) ktm, gejunuloj pĉt. *Vilkaviškis*, s. Neries 33b-39. Litovio SU-234.270. — S-ro Oleg Kogelnicanu (32) kun hungarinoj, naturistoj, pri la movado, k.a. *Narva-5*. p.k. 627. Estonio SU-202.000. — S-ino Valentina G. Bošmanova (26) edzino, pri muziko, liter. kaj sporto, kol. bk, fotoj. *Veliko Tarnovo*, ul. M. Gabrovska 6/B-13, BG-5000. — S-ro Phan Kim Viét, ktm pri Eo, pacbatalo, ekonomio, historio, pm, vojaĝoj. Nova adreso (anst. Nha Trang) T.X. Tuy Hoa, Phú Yên, 191 Lê Thánh Tôn, Vjetnamio. — Kunlaborantino de HEA-eldonejo, dipl. instruistino Dora Herceg (26) pri turismo, vojaĝoj, kol. diskojn kun popolkantoj. H-1076 *Budapeŝto* Thököly út 25. III. 22.

E-invalidoj de ĈEA invitas al solenaĵo je 5a datreveno de fondiĝo, en *Slany* je 8-11a de junio 1990. Informas: E-Luvalidoj, *Slany* P.K. 63. CS-274-01. — Singapura E-Asocio invitas por inspiroj, korespondi: prezidantino Lee Kim Kieu, BIK II, Jalan Batu 04-152, Singapore 1543. — F-ino Bannikova Ludmila (16) pri pentrarto, gitarludo, kol. kalendaretoj, bk. *Leninogorsk* pr. Lenin 16-30. Kazaha SSR, SU-493.910. — F-ino Danguolė Ignatavičiūtė (16) lernantino, ktm, pĉt, kol. bk. *Alytus* Petkevičiaus 10-71. Litovio SU-234.580. — S-ro Mirosław Zawadzki (20) pri sporto, muziko, danco. *Gdansk-Oliwa* str. Obr. Wybreza 4c/85. PL-80-398. — F-ino Malgorzata Mateusiak (26) ktm, *Syców* ul. Sz. Szeregów 3m4, PL-56-500. — Lernanto Przemek Przybylski (17) pri liter. kaj historio de Japanio, kol. pm, bk. *Poznan* ul. Jutrzenka 6a/10, PL-60-373. — Studento Decio Baixo Alves (16) ktm, *Biguacu-S. Catarina*, Rua L. Freiburger 21, CEP 8816 Brazilo. — Ediná Brasinha Ribas (63) eks-ŝtato-ficistino, ktm. *Estreito-Florianópolis-S. Catarina*, Rua. Cor. P. Demoro 2096, CEP 880 Brazilo.

D-ro Martin SCHÜLER, Kleinmachnow, GDR: Nia malnova abonanto esprimis aparte kontanton pri la lingvo-temaj artikoloj de Claude Piron kaj alior de Giorgi, kiuj prezentis bonvenajn ekzemplojn pri altaj kapabloj de nia lingvo. Ni plene konsentas pri via deziro por pli profunda ekspluatado de niaj vortkreaĵoj — kompreneble atentante la internacie akireblan klarecon! Nuntempe ĉiuj lingvoj konfrontas kun la lavange alvenantaj fremdvortoj, kaŭze de la haste-modernaj, pli kaj pli novaj aĵoj kaj aferoj, samtiel Eo. Evidente, niaj aŭtoroj havas la devon saflanke bremsi ties superabundigon, kaj anstataŭ uzi (eble arbitre) „neologismojn“, serĉi inter la latentaj ebloj de Eo. Vian admiron pro la plimultiĝantaj reklamoj ni transdonis al niaj fervoraj reklamvarbantoj.

S-ro Cvi LÖWENKOPF, Emek Hayarden, Israelo: La perditan n-ron dume vi certe ricevis, ĉar pri via abona fideleco ni jam „rajtas fari deklarojn“, certe ne „facilanimajn“ — kiel tekstis en nia krucenigo, kiuj bedaŭrinde fojfoje enhavas desegnajjn aŭ tajpajn erarojn. Iom simile, okazas foje interŝanĝ(i)oj pri bildoj, kiel tio okazis i.a. sur la p. 83. — kion ankaŭ vi bonokule rimarkis. — Ni atentigas, ke la volumo „PERFEKTA CIVITANO“ enhavas senescepte ĈIUJN novelojn de SÁNDOR SZATHMÁRI. La iam eldonita novelkolekto „KAIN KAJ ABEL“ konsistigas nur etan parton de tiu tuta novelverkaro de nia granda prozisto. Povas esti, ke via supozo pravas, kaj eble nur vi estas kibucano inter niaj abonantoj; pro tio akceptu aparte niajn varmajn bondezirojn por via sano!

S-ro Valerij JUDIN, Perm, SU: Ankaŭ vi estas dankinda pro lertaj rimarkoj de kelkaj, feliĉe ne malklarigaj preseraroj, kiujn vi metis rapide en orda vico. La spritaĵoj — bedaŭrinde — nia humoristo-rubrikestro devas ne publikigi pro kompreneblaj kaŭzoj, aliflanke estas ni, kiuj trovis „mis-tera“ vian demandon pri Suomio. S-ino HORVÁTH Béláné, Kalocsa, H: Pli ol dekjara estas la kontinua abonado de H.V. iranta al la hejmo de nia fidela legantino — kaj enigmo-solvantino. Same, kiel la ĉi-supraj legantoj, ankaŭ vi esprimas varme, kiajn legoplezurojn kaj bonvenajn informojn transdonas nia revuo. Superflue skribi niaflanke, ke tiaj „kvintancoj“ valoras tre-tre multe por nia redakcio, kaj ili instige stimulas nin al redaktado pli zorga, por pli legindaj numeroj de nia revuo. Ni konsideras tiun nian taskon grava devo al nia internacia legantaro. Dankan saluton!



HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficjoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. •

Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

Készült a MÉMMI sokszorosító üzemében, Gödöllő – 445/89



Demonstrejo de banĉambroj VIDIA


Freged, Kossuth L. u. 9-13.

Tel.: 24240






KORAN BONVENON EN DEPARTEMENTO K O M Á R O M

Agrablaj plezuroj atendas la vizitantojn en la pitoreskaj
urboj ESZTERGOM, TATA kaj KOMÁROM.




La kuracakvan termobanejon de Komárom indas ĝui dum la tuta jaro.

Apud la termobanejo situas la dustela nova HOTEL THERMÁL
de KOMTURIST — taŭga gastejo por ripozantoj.



Estu nia gasto en Tata, Komárom, Esztergom.



1990 -03- 2 8

Informojn volonte donas al Vi:
Centro KOMTURIST
H-2890, TATA, II., Ady E. u. 24.
Telefona: 34/83-211 Telekso: 27-459

